# Historio de Goo en Koreio

– Tradukaĵo el retpaĝoj;
https://namu.wiki/w/바둑/한국의 역사
https://ko.wikipedia.org/wiki/삼국_시대
https://ko.wikipedia.org/wiki/바둑


– Tradukaĵo el retpaĝo;
https://ja.wikipedia.org/wiki/巡将碁

# - Tradukaĵo el retpaĝo; https://namu.wiki/w/바둑/한국의 역사 k.t.p.

Estas registraĵoj, kiuj diras ke GOo en Koreio estis transdonita ekde la periodo de la Tri Regnoj en korea duoninsulo (inter la 1-a jarcento a.K. kaj la 7-a jarcento).

La plej malnova rekordo pri GOo enlande estas en "Historia registraĵo de Tri Regnoj(三国史記)", kiu mencias ke reĝo *Jangsu* (長寿) de *Goguryeo* (高句麗: unu el la Tri regnoj), aŭdinte onidirojn ke reĝo *Gaero* (蓋鹵)de *Baekje* (百済: unu el la Tri regnoj) ŝatis ludi GOon, sendis la monaĥon *Dorim* (道琳) al *Baekje* (百済) por ludi GOon kun reĝo *Gaero* (蓋鹵), dum *Dorim* (道琳) ankaŭ faris spionadon kontraŭ *Baekje* (百済).

https://ko.wikipedia.org/wiki/삼국_시대




576년, 신라의 전성기.
En la jaro 576, la ora epoko de Silla.

진흥왕 37년, 진지왕 원년)
(La 37a jaro de la reĝo *Jinhŭng*(真興),
la 1a jaro de la reĝo *Jinji*(真智))

Pri *Silla* (新羅: la alia el la Tri regnoj), oni supozas, ke ŝtonetoj elterigitaj el *Hwangnam* (皇南)-granda tombo kaj *Cheonma* (天馬)-tombo, kiuj estas taksataj fariĝi en la 5-a jarcento, povus esti uzataj kiel ŝtonoj por la ludo de GOo. Sur ĉina lakaĵo, kiu estas supozata esti uzita por konservi tiujn GO-ŝtonojn kaj estis elterigita kune kun ili el *Hwangnam* (皇南)-granda tombo, estas gravurita la nomo de *Ma Rang* (馬朗), fama ludanto de GOo en Ĉinio dum la epoko de Okcidenta *Jin* (西晋) en la 3-a ĝis 4-a jarcentoj, kiu ricevis la honoran titolon "Kisei(棋聖)" (GOa-sanktulo). Ĉar tiaj objektoj por GOo estis entombigitaj kiel oferaĵoj en *Hwangnam* (皇南)-granda tombo, oni kredas, ke ankaŭ la entombigito mem ŝatis ludi Go dum sia vivo, kaj ke la ludo de GOo estis same disvastigita en *Silla* (新羅), kiel en *Baekje* (百済) tiutempe.

Aliflanke, en la ŝtonĉambro de la tombo n-ro 6 en *Yonggang-dong* (龍江洞), en urbo *Gyeongju* (慶州) — la tombo de nobelo de *Silla* (新羅), kiu mortis komence de la 7-a jarcento — estis ankaŭ malkovritaj ŝtonetoj, kiuj estas supozataj esti uzataj kiel Go-ŝtonoj dum la periodo de *Silla* (新羅).

圍棋(*Weiqi*)-바둑(Baduk)-碁:GOo

Dum la epokoj de *Goryeo* (高麗: p.K. 918–1392) kaj *Joseon* (朝鮮: p.K. 1392–1897), GOo estis aktiva, kaj eĉ kortegaj virinoj ĝuis ĝin kiel hobion.

Tamen, laŭ la registara vidpunkto, GOo estis taksata malalte kiel teknika arto dum la *Joseon* (朝鮮)-epoko. En la Annalaĵoj de la *Joseon* (朝鮮)-Dinastio, oni trovas multajn artikolojn kritike pritraktantajn la negativajn efikojn de GOo.

Sed, Ĉar ĝi estis tiel amuza, multaj homoj daŭre ĝuis ĝin kiel hobion. Precipe en la fino de la *Joseon* (朝鮮)-periodo, la formo de "*sunjang baduk* (順将囲碁)" fariĝis ĉefa.




Korea paro ludanta go-ludon ĉirkaŭ la jaroj 1910–1920.

# – Tradukaĵo el retpaĝo; https://ja.wikipedia.org/wiki/巡将碁

Oni supozas, ke la ludo de go alvenis al Koreio el Ĉinio ĉirkaŭ la 1-a jarcento a.K., kaj la unuaj registraĵoj pri go aperis ĉirkaŭ la 5-a jarcento.

Ekde la fino de la 16-a jarcento, ĝi disvastiĝis inter la *Yangban* (両班: nobelo, kiu servis kiel oficisto dum la dinastio Li(李) )-klaso.

Tial, oni ĝenerale opinias, ke la GOo de Ĉirkaŭirantaj Generaloj (巡将碁) ankaŭ komenciĝis de la 16-a ĝis la frua 17-a jarcento.



Koncernate la GOon de Ĉirkaŭirantaj Generaloj (巡将碁), ekzistas la opinio de japanaj verkistoj, ke la GO-tabulo “木画紫檀棊局(GO-tablo el malhelpurpure ruĝa ligno kun bild-ormanojn)” inter la trezoroj en “正倉院 (la trezorejo de la templo Tōdai-ji en Nara, Japanio)” estas koredevena tabulo, ĉar la lokoj de la steloj sur la tabulo kongruas kun la komencaj ŝtonoj en turnogenerala go. Ili supozas, ke la GOo de Ĉirkaŭirantaj Generaloj komenciĝis jam en *Baekje* (百済) ĉirkaŭ la 7-a jarcento.





En la mezo de la 20-a jarcento, *Cho Nam-chul* (趙南哲), kiu trejnis en Japanio kaj poste revenis al Koreio, fondis la Koreian Go-Instituton kaj popularigis japanstilan GOon kun liberaj komencaj ŝtonmetoj.

Kiel rezulto, la GOo de Ĉirkaŭirantaj Generaloj (순장바둑 Sunjiang Baduk: 巡将碁) malofte plu estas ludata.